

BELGA ESPERANTISTO

48a Jaro — N-ro 5a — Majo-Junio 1956a

Fondita
en 1908a



Abonprezo:
Fr. 100,-

Redaktoro-Administranto:
la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,
aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

NIA KVARA BENELUKSA KONGRESO EN GENTO

Dum Mamerto sabate vintretis, Pankraco, dimanĉe printempis kaj Servato, lunde someradis



La Kongresanaro

(Foto Leon Besbrugge, Gento)

„La vetero ne promesis multon bonan, kiam la Kongresanoj, sabatmatene ellitigis kaj pretigis sin por la vojaĝo al Utrecht, kie estis okazonta la tria granda renkontiĝo de tri Ligoj.”

Tiel komenciĝis la raporto pri nia komuna Beneluxa Kongreso de pasinta jaro. Kaj, per la samaj vortoj, povus komenciĝi tiu ĉi raporto pri nia kvara en Gento.

Ne pluvis, sed la vetero, jam de du tagoj, akre refreŝiĝis, tiel ke oni povis kredi ke ni travivas, kun semajna prokrasto, la kutiman pli malvarman periodeton de la Glaci-Sanktuloj.

Sed feliĉe, — kaj kiel S-ro Jaumotte je la adiaŭa momento, lundon ĉe la tagmanĝo, povis konstati —, la tri Sanktuloj Mamerto, Pankraco kaj Servato alportis al ni, vintran tagon ja, laŭ temperaturo, sabate; printempan jam dimanĉon, sed vere someran, sunan tagon por la vizitoj de lundo.

Kaj la Kongreso evoluigis sen unu pluvguto, tiel ke, ĝenerale, neniu rajtas plendi pri la vetero, kiu favoris nian Kongreson.

Sabaton posttagmeze

Jam de l' tagmezo, kelkaj membroj de la L.K.K. kunvenis en la akceptejo por ĉion ordigi kaj, kiam la vizitontoj alvenis, ili estis tre rapide helpataj de F-ino J. Terry, la vigla kasistino de la L.K.K. kaj de S-ino M. Van de Velde, kiu kun afablaj rideto kaj vorto transdonis al ĉiuj la tradician koverton, en kiu estis kunigataj la diversaj dokumentoj rilatantaj al la Kongreso, kaj inter kiuj estis ne nur la kuponaro kaj la programlibreto, sed ankaŭ lukse eldonita kaj vere interesa turisma broŝuro pri Gento, eldonita de la urba administracio. Helpis ilin S-ro A. Van de Velde.

Kvankam la solena malferma kunsido estis antaŭvidita nur por la oka horo, tamen jam posttagmeze okazis, en la salonoj de „Colombophile”, diversaj kunsidoj pri kiu raportoj estas aparte legeblaj sub la rubriko de la respektivaj Ligoj, en tiu ĉi aŭ en la sekvonta numero.

Inter ili estis kunveno de la akciuloj de la Koopera Societo „Belga Esperanto-Instituto”, laborkunsidoj de la membroj de Belga kaj Flandra Ligoj

kaj estrarkunsido de LEEN.

Restis al ĉiuj tamen la necesa tempo por la vespermanĝo kaj, akurate je la 8a, ĉiuj rekuniĝis en la akceptejo.

La malferma kunsido de la Kongreso

Estis antaŭ jam tre multnombra ĉeestantaro, — ni tie ĉi atentigas ke 244 personoj aliĝis al la 4a Beneluxa Kongreso —, ke malfermiĝis tiu ĉi solena kunsido.

Sur la podiumo eksidis S-ro G. De Boes, prezidanto de la L.K.K., kun la tri prezidantoj de la respektivaj Ligoj: S-roj H. J. Blokker; G. Debrouwere kaj M. Jaumotte.

S-ro G. De Boes salutis, per trafaj vortoj, la alvenintojn; donis kelkajn klarigojn pri la preparoj kaj klopodoj faritaj por la bonorganizo de la Kongreso; tiuokaze substrekis la servojn faritajn de ĉiuj la L.K.K.-anoj kaj esprimis la esperon pri plej glata evoluo de tiu ĉi Kongreso.

S-ro H. J. Blokker, nome de L.E.E.N. esprimis sian ĝojon pro la fakto ke tiu ĉi kvara renkontiĝo en Beneluxa kadro, permesas denove kunigi multajn samideanojn en atmosfero, kiun

li deziras same bone, same amika kiel dum la antaŭaj Kongresoj.

S-ro Debrouwere, nome de Flandra Ligo, aldonis siajn bondezirojn kaj esprimis la esperon ke niaj respektivaj Ligoj povos, per speciala klopodo, venigi al niaj Kongresoj pli multe da junuloj ol ili ĝis nun jam sukcesis akiri. Li aldonis dankvorton por S-ro De Boes, al tiuj, kiujn tiu ĉi lasta jam direktis al siaj kolegoj en la L.K.K.

S-ro M. Jaumotte, kiun S-ro De Boes, prezentis kiel la „dolĉan voĉon”, volis, — antaŭ la komenciĝo de la kvara kongreso —, dum momento memorigi la agrablajn tagojn pasigitajn kune en Utrecht, pasintan jaron, okaze de la tria. Li salutis la membrojn de la L.K.K. de Utrecht, kiuj nun ĉeestas en la salono, kaj ilin ree dankis, same kiel la tiam jubileantan asocion LEEN.

LA DIMANĈA TAGO

La Di-servoj

Jam frue, multaj kongresanoj partoprenis, dimanĉmatene, unu el la du Diservoj organizitaj:

Por la katolikoj, en kapeleto de la Sta. Michielsstraat, kie Pastro J. De Maeyer, kiel kutime, predikis dum la Sankta Meso, kiun helpservis frato Arni De Corte.

Por la protestantoj, en la „Hervormde Kerk” de la Brabantdam, kie S-ro W. H. Koopman prizorgis la servon.

La Ligaj kunvenoj

Je la 10a, ĉiuj kongresanoj direktis sin al la ejoj, kie estis okazontaj la kunvenoj de la respektivaj Ligoj: „Brasserie de Londres” por la nederlandaj samideanoj; „Colombophile” por la belgaj, apartenantaj al ambaŭ Ligoj.

Je la vera momento, kiam en tiu ĉi lasta kunsido estis komenciĝontaj la laboroj, elsaltis el aŭtoĉaro kaj envenis la akceptejon tridek unu britaj kongresanoj, kiuj partoprenos la tutan dimanĉan tagon de la Kongreso.

Je invito de S-ro M. Jaumotte, prezidanto de R.B.L.E., la membroj de Flandra Ligo, dummomente, kun-kunvenis en la granda salono, por ebligi al S-ro G. De Boes specialan bondezirigon al la ĵus alvenintaj anglaj samideanoj.

Estis ne-antaŭvidita, mallonga sed agrabla ceremonieto, dum kiu la Britoj, — antaŭ ol foriri por vizito al la Grafkestalo, sub la lerta gvidado de S-ro Maurice De Clercq —, povis tamen jam kontakti gravan parton de la kongresanaron kaj enbaniĝi tuj en la atmosferon de tiu kongreso, vere internacia, se ni priatentas ke, krom la belgoj kaj la nederlandanoj, krom la 31 britoj, ankaŭ enskribiĝis por nia Kongreso 22 francoj kaj kelkaj

Li ekvokis agrablajn momentojn el la longa esperanta kariero de S-ro De Boes, kiu, — kiel S-ro Debrouwere jam akcentis —, estis la organizanto de Kongreso en tri diversaj urboj en kiuj li, laŭvice, loĝis: Sta Nikolaŭ, Ronse kaj Gento.

Li diris sian fidon en la plensukceso de tiu ĉi kvara frata renkontiĝo.

Vizito al la lumigitaj monumentoj

Kaj post komuniko de kelkaj pliaj informoj, la Kongresanaro forlasis la kunvenejon por unua vizito al la malnova Gento, kies antikvaj kaj gloraj monumentoj estas ĉiuj lumigitaj.

S-ro A. Van de Velde, dumvoje, klarigis la plej gravajn detalojn pri tiuj monumentoj, kiuj ĉiuj atestas pri la grava rolo, kiun Gento iam ludis en la historio de la Graflando Flandrio kaj en la tuta evoluo de la malalta provincaro.

germanoj, hungaroj, skoto kaj eĉ jugoslavoj.

Tuj poste, ambaŭ Ligoj de Belgio ekkomencis siajn laborojn: Flandra Ligo do sian jarkunsidon kaj Reĝa Belga Ligo sian solenan festkunsidon, ĉar, je la 11,30a h., ĉiuj devos jam esti en la Urbdomo por la akcepto.

La oficiala akcepto

Estis vere tre impona grupo kiu, — akurate je la fiksita horo, — alvenis el diversaj direktoj, en la grandan enirsalonon de la tre bela Genta urbdomo.

Delegacio, kiu konsistis el la membroj de la L.K.K., kaj el D-ro P. Kempenaers, prezidanto de B.C.K.E., la tri Ligaj prezidantoj jam cititaj kaj delegitoj de ambaŭ plej grave reprezentataj nacioj: S-roj W. M. Goodes kaj R. Curnelle, estis invitata rekontiĝi kun la urba reprezentaro, dum la kongresanoj grupiĝos en la granda akceptsalono, la fama Paciga Salono, atestanto de tiom da gravaj okazaĵoj.

S-ro G. De Boes prezentis la delegacion al la Skabenaro: S-ro Prof. Hacquaert skabeno de Publika Instruado, la akceptonto, kaj S-roj Cnudde kaj Luyckx, kiuj tre afable interparolis kun la diversaj delegitoj.

Dum, sur la orgeno, estis ludata la Belga Nacia Himno, la Brabantkanto, la Skabenaj Moŝtoj kaj la delegacio eniris la vere tre solenan salanon kaj eksidis sur podiumo, kie du seĝoj estis speciale rezervitaj al la akceptonto, Prof. Hacquaert, kaj al la dankonto, S-ro M. Jaumotte.

Prof. Hacquaert tuj ekparolis pri nia lingva demando mem: li scias ke multaj scienculoj kaj membroj de la elito volonte kontentiĝas per la kono de la plej gravaj naciaj lingvoj, kvankam

li ja ankaŭ scias ke sciencaj revuoj jam uzis esperanton; li ankaŭ aludis la plej gravajn lastajn paŝojn en la esperanta movado kaj i.a. la okazintaĵojn en Montevideo, kie la reprezentanto de tiu Danlando, kie ni, tiun ĉi jaron, kunvenos, montriĝis kontraŭulo de Esperanto, sed ricevis trafan respondon de la delegito de la universala movado.

Li ĉiokaze persone estas konvinkata ke, — malgraŭ tiuj kontraŭstaroj en iaj elitaj kaj aliaj rondoj, — Esperanto povas esti potenca allogilo por la granda amaso, kiu nun, — pli ol iam antaŭe —, deziras rektan kontakton kun homoj de aliaj nacioj.

Li finis sian flandralingvan paroladon per saluto al ĉiuj kongresanoj, saluto kiun li ankaŭ rediris en franca lingvo, honore de la valonaj kaj francaj samideanoj.

S-ro M. Jaumotte tuj petis la permeson resume traduki tiun belan paroladon kaj tion, — senmikrofone sed tamen laŭte kaj tre flue, — faris, tiel ke la aplaŭdoj post la traduko devis evidentigi al la parolinto, la facilan kaj plenan paroleblecon kaj kompreneblecon de nia lingvo.

S-ro M. Jaumotte tiam sin turnis nederlandlingve al la skabenaro. Li konstatis ke, malgraŭ ke ni ĉiam regule kaj preskaŭ tradicie estis akceptataj en la respektivaj urbdomoj, ni ĉiam kun ĝojo kaj fiereco estas re-akceptataj de la plej altaj instancoj en la urboj, kie ni kongresas. Kun ĝojo kaj fiereco, ĉar, — post tutjara streĉa propaganda laboro por afero fakte plej grandparte idealisma, — estas refortigo por multaj, kiam la unuaj civitanoj de tiuj famaj urboj, kiuj forĝis nian historion, — ĉiu laŭ sia menso, sed tamen ĉiuj same simpatie, — salutis tiun laboron kaj kuraĝigas al plia laboro.

S-ro M. Jaumotte, je l'intenco de niaj britaj, francaj kaj aliaj eksterlandaj amikoj, ankaŭ tradukis resume en esperanton, sian flandralingvan paroladon, kiu estis varme aplaŭdata de ĉiuj.

Post aŭskulto de la „Naar Wijd en Zijd — Vers l'Avenir”, ankaŭ orgene ludata, rondiris la ĉampanpokaloj kaj ĉiuj toastis al la fina, glora venko.

Je peto de kelkaj membroj, S-ro D. Van der Stempel estis rajtigata ludi, en la akceptsalono kaj sur la orgeno nian himnon „La Espero” kaj estis agrabla surprizo, kiam la tri skabenoj kune petis ke estu sendata al la urba administracio la partituro de tiu kanto, por ke ĝi povu esti ludata en iaj cirkonstancoj: ekzemple kiam diverslandanoj estos akceptataj kaj kiam oni do ne povas ludi iun difinitan nacian himnon.

La Skabenoj petis la estrarojn kaj la membrojn, kiuj deziras, subskribi la oran libron de Gento, en kiu speci-

Nia kvina Beneluksa Kongreso

Nia kvina Beneluksa Kongreso okazos, — laŭ interkonsento inter la tri Ligoj, — dum 1957, en Nederlando.

S-ro H. J. Blokker, prezidanto de L.E.E.N., ne jam povis konigi definitive al la kongresanoj en Gento, la nomon de la elektota urbo. Sed, tre verŝajne, la elekto estos inter Arnhem kaj Eindhoven.

Kiel dirite en la raporto pri la Kongreso, jam 50 membroj de Reĝa Belga Ligo Esperantista aliĝis al tiu ĉi Kongreso kaj pagis sian kotizon.

La aliaj, — jam de nun, — povas sendi sian aliĝon al siaj respektivaj kongreskasist(in)oj.

Kaj ili faru, kiel eble plej baldaŭ! Siaflanke, la estraro de L.E.E.N., — kiel eble plej baldaŭ, — konigos sian decidon pri la kongresurbo.

ala paĝo estas rezervita, sur kiu la surskribo pri nia Kongreso estas pentrita en nia verda koloro.

Post ankoraŭ iom longa babilado, la skabenoj retiriĝis kaj la membroj estis invitataj sekvi la oficialan gvidiston, kiun la adminitracio speciale, — kaj ni povas diri escepte, — metis je nia dispono, nome S-ro Saye.

En la diversaj salonoj de la urbdomo, tiu ĉi klarigis flandralingve la historiajn sciindaĵojn, dum S-ro M. Jaumotte ilin tradukis.

La fotografado

Kaj post dankaplaŭdo al la gvidisto, ĉiuj direktis siajn paŝojn al la apuda Teatro, kie okazis la fotografado, iom komplikigita pro la fakto ke la Placo, — kun statuo en la mezo, — ne permesas laboron el ioma foreco. Tio devigis al iom longa regrupigo de la vere tre ampleksa grupo.

La rezultato tamen estis bona, kiel evidentigas el la nur kliŝa represado de la fotografajo mem, kiu ankoraŭ estas akirebla ĉe la L.K.K. je la prezo de Fr. 25.

La komuna tagmanĝo

Ni ne parolu pri festeno, sed ni diru tamen, ke la iom festa komuna tagmanĝo, en la bone konata „Raadskelder” sub la Belfrido, estis sukcesa, tre certe laŭ nombro de la partoprenantoj, ĉar preskaŭ la tuta kongresanaro trovis tre oportunan lokon ĉe la multnombraj apartaj tabloj, sed ke ĉiuj ankaŭ, kun bona apetito, enkorpiĝis la sinsekvajn menuaĵojn:

Diversaj antaŭmanĝaĵoj

Cerefolia supo

Porkaĵo kun fazeoletoj kaj terpomoj

Deserto

Ne estis oficialaj toastoj aŭ parola-

doj, nur komunikoj pri la okazontaĵoj de l' posttagmezo kaj vespero.

Promenado tra malnova Gento

Tiam S-ro A. Gruslet kaj S-roj G. De Boes kaj A. Van de Velde grupigis ĉirkaŭ si parton de la kongresanaro, por ebligi bonan kaj trafan klarigon, dum rondira promenado tra la malnova Gento.

Kaj, por tiuj kiuj jam sabatvespere vidis la lumigitajn monumentojn, la ĉetaga revido estis agrabla surprizo.

Ĉiuj multe ĝuis tiun promenadon, kiu okazis en jam multe pli milda atmosfero, ol la antaŭan vesperon.

La Festvespero

Ĉar la programo kunmetita por tiu ĉi festvespero estis iom ampleksa kaj ĉar multaj tamen ankaŭ ŝatas danci dum kelkaj horoj, oni estis petinta la kongresanojn esti en la granda salono de „Colombophile” jam je kvarono antaŭ la oka.

Tio cetere ankaŭ permesis al la britaj samideanoj, kiuj estis reveturontaj iom post la naŭa, pro la loĝado en Blankenberge, kunĝui parton de tiu programo.

Ni ne povas kaj ne deziras laŭdi aparte ĉiujn la bonvolemajn artistojn, kiuj partoprenis al la efektivigo de la programo kaj kiuj apartenas al la Antverpena sekcio de RBLE, la Grupo „La Verda Stelo”, al la Bruĝa sekcio de Flandra Ligo kaj al la Brusela sekcio de RBLE.

Ni diru nur ke, kun siaj multe ŝatataj muziknumeroj ĉe la pianoforto, belaj esperanto-kantoj, diversaj kabaretaj numeroj kaj tre trafaj skeĉoj, inter kiuj unu pritraktis ĉe okazaĵojn el nia esperanta movado, la tuta programo, — bonege kaj gaje prezentata de S-ro J. Verstraeten, el Antverpeno, — ĝuis plej grandan kaj plenmeritan sukceson. Longa aplaŭdo sekvis ĉiun prezentitan numeron.

Ni do, ĉi sube, kontentiĝas per represo de la programo:

1. *Kantnumero de S-ro K. Ameryckx, kun piano-akompanado de F-ino Cl. Peeters (Ambaŭ el Antverpeno).*

2. *Gitara muzikaĵo „Robert kaj Bertrand”, prezentita de S-roj W. Van Nereaux kaj J. Vinck (Ambaŭ el Antverpeno).*

3. *Skeĉo „Du estas tro malmulte kaj tri estas tro”, verkita de Sam. A.*

LA LUNDA TAGO

Antaŭtagmezaj vizitoj

Estis belega vetero, tiun lundon matene, kiam ĉiuj je la 9,30a h., retrovis unu la alian, ĉe la enirejo de „Colombophile”, por redividiĝo en tri grupoj, kiuj respektive vizitos la „By-

Dumarey, kiu kunludis kun S-ro M. T. Maréchal-Roose kaj S-ro G. Maertens (Ĉiuj tri el Bruĝo).

4. *Kantrondo de S-roj W. Van Nereaux kaj J. Vinck (el Antverpeno).*

5. *Pianludado „Mazurka” de Peter Benoit, de F-ino Evelynne van den Neste, el Antverpeno.*

6. *Skeĉo „La sana Menso de la Homaro”, de Aversjenko, adaptita de S-ro G. Maertens, kiu kunludis kun S-roj A. Dumarey, F. Roose kaj R. Iserentant (Ĉiuj el Bruĝo).*

7. *Pianludo de S-ro D. Van der Stempel, el Bruselo: „Cuba”, de Albeniz.*

8. *Skeĉo „La Gazeto”, tre modernstila klarigo pri la moderna influilo, verkita kaj adaptita al la Kongreso de S-ro A. Dumarey, kiu ludis kun S-ro G. Maertens (ambaŭ el Bruĝo).*

9. *Kantnumero de S-ro K. Ameryckx, kun piano-akompanado de F-ino Cl. Peeters (ambaŭ el Antverpeno).*

10. *Senvorta, iom cirka numero „La fortaj Homoj”, de S-roj W. Van Nereaux kaj J. Vinck, kaj prezentita de F-ino J. Ameryckx (Ĉiuj tri el Antverpeno).*

11. *Skeĉo „La tro mallonga Pantalono”, adaptita de S-ro G. Maertens, kiu kunludis kun Gesinoroj F. kaj H. Roose, kun S-ro M. T. Maréchal-Roose kaj F-ino S. De Koninck. Ĉiuj el Bruĝo.*

Je iu momento de tiu ne nur ampleksa, sed vere tre taŭga kaj amuza programo, S-ro Goodes elparolis, nome de la britaj amikoj, adiaŭan vorton al la Kongreso.

Li diris la ĝuon de siaj samnacionoj, dum tiu bela tago; dankis la organizintojn pro iliaj klopodoj kaj deziris al ĉiuj ankoraŭ sukcesplenan daŭrigon.

Tuj poste la britaj amikoj, — senbrue, — forlasis la salanon, kie plue disvolviĝis la cetera parto de la programo.

Kaj, proksimume je la deka kaj duono, la danco povis komenciĝi.

La orkestro aŭdigis „La Espero” n kaj tuj ekkomenciĝis plej vigla dancado, kiu daŭris ĝis...iom frue kaj finiĝis per la reaŭdigo de nia himno.

Ni substreku, ke ŝajnis esti pli multe da fervoraj dancemuloj, ol en antaŭaj similaj cirkonstancoj, kaj ke ĉiuj plej bone amuziĝis ĉe la ritmo de cetere tre bona orkestro De stoop.

loke-muzeo” n, sub givdado de S-ro A. Gruslet, kiu preparis tre kompletan esperantan dokumentaron pri tiu ĉi belega kaj riĉega muzeo; al la „Grafa Kastelo”, verŝajne la plej konata Genta Muzeo, kie S-ro A. Van de Velde donis ĉiujn klarigojn; al la Bo-

Dankvorto de la L.K.K.

La L.K.K. de nia Genta Kongreso kiu, kiel ĉiu scias, konsistas el:

S-ro G. De Boes, prezidanto
S-roj E. De Wolf kaj J. Timmerman, viceprezidantoj
S-ino A. Gruslet, sekretariino
F-ino J. Terryn, kasistino
S-ro V. Vanneste kaj S-ino Br. Van Wanseele, kiu kelkajn tagojn antaŭ la Kongreso, forlasis Belgion por vojaĝo al Kongolando, gemembroj, deziro, per tiu vojo, danki ĉiujn, kiuj ne nur el la organizintaj landoj, sed ankaŭ el diversaj aliaj, multnombro ĉeestis; kaj ankaŭ tiujn, kiuj iamaniere, surloke, antaŭ kaj dum la kongreso, en niaj revuoj kaj en la gazetaro, helpis al la sukcesigo de tiu ĉi Kongreso.

Ĉiuj membroj de la L.K.K. mem plej agreble memoros pri la kune pasigitaj tagoj.

tanika Gardeno. Tiun ĉi grupon persone gvidis S-ro G. De Boes.

Mirinde estas, ke kiam ĉiuj rekuniĝis, tagmeze en „Raadskelder“, ĉiuj havis la impreson ke ili certe estis farintaj la plej bonan elekton, rilate al la antaŭtagmeza vizito. Ĉiu estis kontenta, ne nur pri la bonega gvidado, sed ankaŭ pri la interesaj administraj.

Tagmanĝo kaj adiaŭo

La oficiala programo, kiun ĉiu trovis en beleta, presigita broŝuro en kiu la L.K.K. kunigis ĉiujn informojn, ankaŭ la kompletan liston de la kongresanaro, antaŭvidis adiaŭan kunveneton, je la 16,30a h., en „Colombo-phile“.

Sed, je la peto de S-ro H. J. Blokker, nome de diversaj nederlandaj amikoj, kiuj devos foriri jam iom rapide, ĉu post la manĝo, ĉu tuj post la posttagmeza vizito, estis decidate, ke la tri Ligaj prezidantoj adiaŭos je la deserta parto de la tagmanĝo.

S-ro H. J. Blokker multe dankis ĉiujn kunlaborintojn, kiuj organizis tiun belan kongreson. Li invitis ĉiujn al la kvina kongreso, kiu, laŭ ĝenerala akordiĝo, okazos en Nederlando, sed en urbo ne jam difinita... Li esprimis sian ĝojon, ĉar li ekaŭdis ke jam kvindek membroj de Reĝa Belga Ligo aliĝis al honora kolono por la KVINNA...kie ajn ĝi okazos!

Kaj la prezidanto de tiu Ligo aldonis: „Aliĝis kaj jam pagis sian kotizon! ...Kaj tio vekis kompreneble aplaŭdon.“

S-ro G. Debrouwere aldonis gratulvortojn, ankaŭ al la kunlaborintoj de la bela festo de dimanĉvespero kaj al S-ro Vanneste, la prizorginto de la bona deserto, kiun oni estis ĝuanta ĉe la du tagmanĝoj.

S-ro M. Jaumotte aldonis sian dank-

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wiirijk.
Viceprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Viceprezidantino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
Ĝenerala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falconrui, 21, Antverpeno.
(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

Reĝa Belga Ligo Esperantista

La solena dumkongresa kunsido

Dum la solena kunsido de R.B.L.E., okazinta dum la Kongreso en Gento, S-ro M. Jaumotte, ĉirkaŭata sur la podiumo, de la emerita prezidanto D-ro

vorton por la L.K.K. al la jam esprimitaj laŭdoj kaj speciale aplaŭdigis la ĉiam vigan F-inon Terryn, ne forgesante la prezidanton, S-ron G. de Boes, la sekretariinon S-inon A. Gruslet, nek la aliajn kunhelpintojn.

En fajra lastvorto li esprimis sian feliĉon, ĉar la Glaci-Sanktuloj alportis, post vintra sabato, printempan dimanĉon kaj bel-someran lundon.

Li adiaŭis la jam mortantan Kvaran, per alvoko kaj certigo por la plensukceso de la Kvina...baldau...morgaŭ...en 1957, en Nederlando!

Vizito al la Folklor-muzeo kaj marioneta prezentado

Je la dua komenciĝis en la Muzeo pri Folkloro detala vizito, dum kiu S-ro Van den Broecke donis klarigojn, tuj tradukatajn de S-ro M. Jaumotte, pri la historio de la muzeo mem kaj pri la enhavo de la kolektoj, kunigitaj en diversaj salonetoj, ne laŭ kronologia ordo, sed grupigitaj laŭ la karaktero, la domparto aŭ la metio.

Je la fino de la vizito, oni haltis ĉe Marioneta Teatro, kaj oni ĉeestis mallongan ludon en pure Genta dialekto, kiu ridigis ĉiujn, kiuj povis ĝin kompreni, kaj certe interesigis la aliajn laŭ folkloro vidpunkto.

Kaj ĉe l' eliro, S-ro Jaumotte ankoraŭ refoje kaj tutspecale dankis S-ron G. De Boes, S-inon A. Gruslet, F-inon J. Terryn kaj ĉiujn iliajn helpintojn pro la bonaj zorgoj...Post kio sekvis senfinaj manpremoj, antaŭ la fina diŝiro.

Ĉiuj foriris tiam, ĉu ankoraŭ al „Colombo-phile“ por trinko de lasta glaso, ĉu al hotelo aŭ stacidomo, ĉu sur la vojoj, antaŭ la Pentekostvespera trafikego.

Sed ĉiuj havis plej bonan impreson pri la ĵus pasigitaj tagoj kaj kunportis la plej bonan memoron pri nia bela Kvara Beneluksa Kongreso, kies agrabla ĉeesto certe instigos ĉiujn al aliĝo al nia Kvina, proksiman jaron, ie en Nederlando!

L. R.

Kempeneers, de la geviceprezidantoj S-ino J. Plyson kaj S-ro J. Soyeur, kaj de la ĝenerala sekretario S-ro H. Sielens, re-bonvenigis ĉiujn, memorigis la laboron faritan de la administrantaro kaj gratulis siajn kunlaborantojn: S-inon J. Plyson, kiu flegas la kongresajn kasojn kaj la fondaĵon A. Jennen; S-ron J. Soyeur, ankaŭ kasiston, kiu ne nur enspezas la monon kaj protokolas pri la administrantaj kunsidoj, sed ankaŭ helpas rekte la prezidanton en la plenumo de liaj taskoj; kaj S-ron H. Sielens, ĝeneralan sekretarion, kiu plenumas la ceterajn estrarajn taskojn je ĉies kontentigo.

Li ankaŭ aplaŭdigis nian dekaninon, S-inon F. Staes, kiu, pli ol 90-jara, tamen veturis Genton kaj ĉeestas la Kongreson.

Li tiam petis S-ron Soyeur legi la raporton de la administrantaro, prezentitan al la ĝenerala jarkunsido, antaŭ kelkaj semajnoj, kaj kiu respegulas la vivon kaj laboron de la Ligo.

Poste, S-ro M. Jaumotte transdonigis la premion Jennen, kiun, tiun ĉi jaron, akiris la Antverpena Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“. Ties sekretario S-ro J. Verstraeten, akceptis el la manoj de S-ino J. Plyson, la ateston kaj donacon, kun la gratuloj de la estraro de la Ligo.

Fine, S-ro M. Jaumotte gratulis la jubileantojn:

Li citis, honorige, ĉiujn por kiuj komenciĝas nova jarkvino:

Estas membrino de 45 jaroj: F-ino S. Obozinski.

Estas membroj de 40 jaroj kaj akiras do la medalon kun la veterana V; S-ino H. Schoofs, malhelpata pro malsano kaj al kiu S-ro Jaumotte portos la medalon; S-ro Morris De Ketelaere kaj S-ro M. Jaumotte mem, sur kies brusto D-ro Kempeneers pinglis la novan medalon.

Estas membroj de 35 jaroj: S-roj Hector Vermuyten kaj Maurice Boeren
Estas membroj de 30 jaroj: S-inoj J. De Hondt, L. Castel kaj H. Moens, F-ino Maria Verbeke kaj S-roj H. Van Roye kaj Louis Genin.

Estas membroj de 25 jaroj kaj akiras do, unuafoje, la de la Ligo starigitan medalon: F-inoj Mathilde kaj Hélène Hofkens kaj S-ro Willy Boffejon.

Ĉies nomoj estis varme aplaŭdataj. Ĉe l' elĉerpigo de la oficiala tagordo, la prezidanto faris la alvokon por la Honora Kolono de la sekvonta kon-

1926 - 1956

Belga Esperanto-Instituto

(Koopera Societo)

Nova periodo de tridek jaroj ekkomenciĝis

La kunsido de B.E.I., okazinta dum la Kongreso en Gento, speciale havis kiel celon, decidi, — laŭ la statuto de la Koopera Societo, — pri la eventuala likvido aŭ pri la daŭrigo de la Societo por nova periodo de tridek jaroj.

Unuanime, la ĉeestantaj akciuloj decidis, laŭ propono de la administrantaro, daŭrigi la laboron en la ĝisnuna formo de koopera societo.

Novaj akcioj, — valorantaj ducent kvindek frankojn, laŭ jam antaŭe prenita decido, — estos eldonataj kaj havigataj al la ĝisnunaj akciuloj.

El la ciferoj komunikitaj, evidentiĝas ke la societo bone fartas kaj senrezerve plenumas la rolon, kiun ĝi ludas en nia movado: la faciligo de la mendo kaj aketo de esperanto-libroj kaj revuoj, al individuoj kaj grupoj.

La stoko de libroj enhavas kvarcent diversajn eldonaĵojn kaj la monrimedoj estas tiaj, ke ili permesas efektivecon de ĉiuj necesaj mendoj.

La administranto-prezidanto S-ro M. Jaumotte aplaŭdigis la nomon de S-ro G. Van den Bossche, kiu prizorgas la glatan funkciadon.

Li ankaŭ memorhonoris la stargintojn de la societo. Kaj ni do, ankaŭ memorige, volas citi tie ĉi la 15 fon-

greso...ie en Nederlando.

Kaj kvindek membroj de R.B.L.E. tuj sin enskribigis...kaj pagis!.. Belga rezultato de solidareco kaj fido.

Poste okazis ankoraŭ monokolekto kiu, krom sumeto en francaj frankoj, havigis al la Ligo pli ol mil belgajn frankojn por panjo la kaso.

D-ro P. Kempeneers, per lasta vorto, rilate al Unesko kaj internaciaj laboroj por Esperanto, konkludis tiun ĉi tre bele sukcesintan kunsidon.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“

(Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 20an de aprilo, okazis sub lerta gvidado de la Prezidanto S-ro M. Jaumotte, amuza vespero, al kiu F-ino H. Hofkens vigle kunlaboris per anekdotoj kaj la publiko per sia partopreno al la diversaj numeroj. Tiu ĉi vespero forpasis en tre gaja kaj agrabla atmosfero.

La 27an S-ro A. Verhoeven paroladis kaj montrigis lumbildojn pri „La malsanulejo Sankta Elizabeto“. Tiuj kiuj estas sanaj

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C^o

LA LOUVIERE S.P.R.L. Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

dintojn, kiuj subskribis la unuajn akciojn, ĉe la fondiĝo la 1-an de marto 1926: F-ino Caroline De Buyser, S-ro Edgard De Coster, S-ro Ant. L. De Hondt, S-ro Morris De Ketelaere, S-ro Maurice Jaumotte, F-ino Jeanne Morrens, S-ro Fr. Schoofs, S-ro Ch. Van der Veken, S-ro J. Van Gulek, S-ro Oscar Van Schoor, S-ro Nic. Van Winde, S-ro Gustave Vermandere, S-ro Hector Vermuyten.

Tiuj ĉi elektis unuan administrantaron, kiu konsistis el:

Administrantaro: S-roj Edg. De Coster, Morris De Ketelaere, Maurice Jaumotte, Frans Schoofs, Oscar Van Schoor kaj Gustave Vermandere;

Gekomisaroj: F-ino Caroline De Buyser, S-ro A. L. De Hondt, F-ino J. Morrens, S-roj Ch. Van der Veken kaj Hector Vermuyten.

La administrantaro elektis kiel funkciulojn: S-ron Fr. Schoofs, prezidanton; S-ron Maurice Jaumotte, administranton-delegiton kaj S-ron Edg. De Coster, administranton-sekretarion.

S-ro Fr. Schoofs prezidis la societon ĝis sia morto en 1934; S-ro G. Vermandere tiam momente reprenis tiun taskon kaj, je lia eksigo, S-ro M. Jaumotte iĝis prezidanto de la Societo kaj plenumas tiun taskon de 1935.

kutime nur malmulte pensas pri malsanulejo. Ili ne havas ideon pri ĝia funkcio, ĝia rolo en la socia vivo, ĝiaj historio kaj ĉiama adaptiĝo al la modernaj postuloj de la nuna tempo. Pri tio S-ro Verhoeven, kiu deĵoras en malsanulejo, en tre bonstila lingvo, detale rakontis. Li mirigis la ĉeestantaron pro la amplekseco kaj la diverseco de la taskoj plenumendaj kaj plenumataj en malsanulejo. La diversaj demandoj post la parolado, al kiu la paroladisto afable respondis, montris la veran intereson kaj atenton.

Por sia vintra provizo

Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe

BELGOMINE

FRANKRIJKLEI, 20

ANTVERPENO

kiu donas specialan premion

ton de la publiko, kiu varme aplaŭdis post la dankvortoj de la Prezidanto.

La 4an de majo, E.K.I.-vespero estis organizata en „Witte Leeuw“, kiun multaj membroj de la diversaj antverpenaj grupoj ĉeestis. Sur la programo troviĝis parolado de S-ro Fr. Van Dooren pri „Meksikio“, kune kun la montrado de en koloraj lumbildoj. Post enkonduko de la E.K.I. Prezidanto S-ro M. Jaumotte kiu prezentis la paroladiston tiu ĉi vere sukcesis kvazaŭ kunpreni la atentplenajn ĉeestantaron en sian vojaĝon al la „fajro-sanga“ lando de revolucioj kaj „banditeros“, sed kies historio tamen montras la altnivelan civilizacion. La multaj anekdotoj kaj sciindaĵoj per kiuj S-ro Van Dooren ilustris sian paroladon, donis al tiu vespero tian specialan atmosferon, kiu sopirigas la aŭskultantojn al sekvonta tia vespero. Per afablaj kaj trafaj vortoj la Prezidanto esprimis sian kaj la dankon de la publiko kune kun la deziro ke, en baldaua estonteco, S-ro Van Dooren povu entrepreni ankoraŭ multajn vojaĝojn al eksterlandoj. Kiel aldoni al la programo S-ro Van Dooren ankoraŭ montris filmon pri la koka bredado kaj evoluo en nia lando kaj eksterlande.

Jaŭdon, la 10an posttagmeze, proksimume 30 verdstelanoj ekskursis al Bouwel, kie ilin atendis S-ro Ch. Aalders, esperantisto kaj enloĝanto de Grobbendonk. Post mallonga promenado, li invitis la partoprenantojn al sia hejmo, kie lia afabla edzino kore akceptis la profitemulojn de la bona kampanjo aero. Prezentado de biero, kafo kaj tortoj, fulmetondre, kreis la veran esperantan atmosferon, kiu daŭris dum la posta promenado laŭlonge de la Albertkanalo. En apudaj kafejoj, oni bonguste kaj malsate formangis la bulkojn aŭ buterpanojn, sed la pluvema vetero malhelpis la realigon de la diversaj ludoj kaj amuzaj distraĵoj antaŭviditaj. Tamen oni dankema je Gesroj Aalders reveturis al la urbo.

La 11an, S-ino R. Lecat paroladis pri „Albert Einstein“, la geniulo de la relativeca teorio. Tamen la paroladistino ne pritraktis tian parton de la vivo de Einstein, sed ŝi detale konigis liajn diversajn ideojn kaj vidpunktojn rilate al la socia vivo, la evoluo de la nuna mondo, la religio, la armeo, k.t.p., ideojn, kiujn S-ino Lecat elĉerpis el du libroj verkita de Einstein mem en tempospaco de 10-jaroj. Je la fino, la publiko, kiu atente aŭskultis, montris

(Sekvo sur paĝo 48)

Esperanto en la Eŭropa Domo

Kiel anoncote okazis en la dua duono de aprilo la 2a Universala Ekspozicio de Esperanto en la palaco de la Eŭropa Konsilantaro en Strasburgo. Estas la materialo de la sama ekspozicio, kiu jam montriĝis en Montevideo, tamen malgrandigita, kiun UEA vidigis en Strasburgo. La celo estis doni al la deputitoj de la Eŭropa Konsilantaro la eblecon informi sin pri Esperanto antaŭ ol decidi pri la konata movo koncernanta eksperimentan instruadon en lernejoj de ses eŭropaj landoj. La malfermo de la ekspozicio donis okazon por eŭropa kongreseto de Esperantistoj, kiuj multnombro kolektiĝis en Strasburgo la 14an kaj 15an de aprilo. Akceptis ilin jam ĉe la stacidomo granda transparento pri la ekspozicio, kiu ankaŭ estis videbla sur alia placo de la urbo.

La oficiala inaŭguro estis laŭprograme antaŭvidita je la tria horo, sed tiu horo estis ŝanĝita en la lasta momento al la kvara, kaj la akcepto ĉe la urbestro programita por la kvina horo tute ne okazis je la granda seniluziigo de multaj venintoj. Nu, je la kvara horo kolektiĝis en la koridoro de la unua etaĝo en la Eŭropa domo en Strasburgo, kie estis la ekspozicio, ĉirkaŭ cent samideanoj, kiuj staris inter la diversaj tabloj kun Esperantaĵoj, por aŭskulti la paroladojn la oficialuloj, kiuj sidigis sur malgranda podio. Parolis kiel unua s-ro Hubert Ferez, lerneja direktoro en Strasburgo, kiu salutis la reprezentanton de la urbestro kaj la prefekton de la departemento Bas-Rhin, kiu anstataŭis s-ran Guy Mollet ĉefon de la franca registaro. Li atentigis pri la signifoplena fakto ke Esperanto nun penetris en la koron de Eŭropo, al Strasburgo la koma ĉefurbo de ĉiuj Eŭropanoj. Transdonis la salutojn de s-ro Guy Mollet, la prefekto kaj tiujn de la urbestro ties reprezentanto, krome s-ino Rabl, kiu reprezentis la aŭstran delegiton ĉe la Eŭropa konsilantaro, s-ran Ludwig, s-ro Petit, tradukis inter la franca kaj esperanta lingvoj kaj fine la ĝenerala sekretario de UEA, d-ro Ivo Lapenna paroladis. Tiu informis ke la ekspozicio de Montevideo estis preskaŭ duoble pli granda, depost tiam nombro de libroj detruigis en inundo kaj aliaj devis esti redonataj al pruntedonintoj. Tamen ankaŭ tia kia ĝi estas, la ekspozicio estas impona dokumento kaj akcentas la kulturalan valoron de Esperanto. Inter la prelegoj kantis infanoj de Strasburgo klaso kaj du fraŭlinoj de la tiea konservatorio. La tuta ceremonio daŭris iom pli ol unu horon, poste oni montris la ekspozicion al

la oficialuloj kaj la esperantistoj havis eblecon viziti la tute novan, tre modernan kaj laŭcelan konstruaĵon de la Eŭropa Konsilantaro.

En la vespero de la sama tago oni kunvenis en Strasburga restoracio por t.n. amikara vespero, dum kiu denove okazis diversaj paroladoj, kantoj kaj amuzaĵoj.

Dimanĉe la kongreso kreskis ankoraŭ konsiderinde, ĉar venis el Germanujo tutaj aŭtobusoj kun samideanoj, tiel ke pli ol 150 personoj ĉeestis la popolfratigan kunvenon, antaŭviditan por la posttagmezo. Ĉeestis naŭ nacioj, el Svislando venis proksimume 15 samideanoj, inter ili la prezidanto de SES, d-ro Perrenoud. Tiu popolfratiga renkontiĝo, kiu daŭris de la tria ĝis preskaŭ la sesa horo, havis iom miksitajn karakterojn, ĉar la multnombraj parolantoj parte faris verajn prelegojn parte diris nurajn salutojn, kaj iliaj eldiroj kvankam enspiritaj de la sama Zamenhofa idealo, tamen ne turnis sin ĉirkaŭ unu certan temon. Prezidis denove s-ro Ferez, kaj kiel unua parolis angla membro de la Eŭropa konsilantaro s-ro David Jones, kiu utiligis la anglan lingvon, sed kies partopreno estis plej grava, ĉar li estas unu el tiuj, kiuj decidis en la konsilantaro pri la sorto de la movo. Bedaŭrinde en la momento de la kunveno la komisiono de la konsilantaro ankoraŭ ne estis decidinta pri ĝi, la informo aperinta en februaro en Heroldo kaj ankaŭ en nia organo estis malpreciza; la Kultura Komisiono elektis nur sian raportantinon sed ne decidis. Do apud la Molotov-telegramo, kiu estis bedaŭrinde nura inventaĵo, ankaŭ tiu informo ne estis ekzakta.

Poste sekvis la alparoloj de la reprezentantoj de la nacioj, kiuj ĉeestis en la Esperantista renkontiĝo en Strasburgo, parolis jenaj samideanoj: por Anglujo Leslie, por Aŭstrio Hugo Steiner, por Germanujo D-ro Herrmann, por Italujo Saggioli, por Usono Dorsay, por Nederlando s-ino Isbrucker, por Norvegujo Bugge-Poulsen, por Sarlando Becker, por Svislando Baur, por la italaj anoj de eŭropa federacio Azzi, por Francujo Petit kaj Laurat, por UEA Lapenna, tiu lasta prezentis la problemon aktualan, ke ni ofte estas metataj antaŭ la demando estis lojala ĉu al nia patrujo ĉu al supera unuo kiel Eŭropo aŭ Tutmondo, por ni devus esti klare ke ni amu nian patrujon, decida estu por ni la lojaleco por la homaro.

La kunveno estis ankaŭ plibeligata per kantoj de lernantoj kaj de kan-

Oficialaj Informoj de la Akademio

(N-ro 22 — Marto 1956)

DEKLARO DE LA AKADEMIO PRI ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO

LA AKADEMIO DE ESPERANTO,

Kontrolinte la vortaron aperintan en 1955 en Meksiko sub la titolo „Ilustrita Vortaro de Esperanto, Unua volumo”, kaj sub la nomo de FRANCISKO AZORIN;

Konstatinte, ke la aŭtoro

1) arbitre enkondukis formojn novajn kaj senprecedencajn por anstataŭigi multajn radikojn de la Fundamento kaj de la Oficialaj Aldonoj;

2) donis al kelkaj fundamentaj radikoj novajn kaj konfuzajn, neniam aprobitajn signifojn;

3) distrancis memstarajn fundamentajn aŭ oficialajn radikojn en radikerojn kaj afiksojn, kiujn li mem elforĝis aŭ provizis per ĝis nun ne konataj sencoj;

Deklaras, ke tiu vortaro atencas al la netuŝebla Fundamento de la lingvo kaj al la tradicio registrita en la Oficialaj Aldonoj, sekve ke ĝi ne prezentas la veran staton de Esperanto;

Avertas la Esperantistojn, ke tiu vortaro povus nur semi konfuzon kaj malordon en la uzado kaj tiel grave malutili al la unueco de la lingvo;

Atentigas anticipe, ke la kritikaj konkludoj, kiujn kelkaj personoj eble faros pri Esperanto surbaze de tiu vortaro, estos senvaloraĵoj, ĉar ili neniel koncernos la veran Esperantan lingvon.

Ir. J. R. G. ISBRUCKER

Prezidanto

tistinoj. Meritas grandan dankon pro la aranĝo de la ekspozicio kaj de la inaŭguro la samideanoj Ferez, Herrmann, Petit kaj Lapenna. Ni esperas ke ilia klopodado ne estos senfrukta.

A. B.

La 21an-4-1956 la Komitato por Kulturaj kaj Sciencaj Demandoj pri-traktis la rekomendproponon pri la eksperimenta instruado de Esperanto kaj la petskribon de UEA pri konsultaj aranĝoj.

Post vigla debato la voĉdonado estis sen findecida rezulto pro egalnombro de la voĉoj por kaj kontraŭ. Tial oni prokrastis ambaŭ aferojn ĝis la venonta sesio dum oktobro ĉijare.

41-a Universala Kongreso de Esperanto

4 aŭgusto - 11 aŭgusto 1956

N-ro 7

OFICIALA KOMUNIKO

Majo 1956

ADRESO: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

BANKO: Handelsbanken, Kopenhago, Danlando.

POSTGIRKONTO: 41-a Univerala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820, Kopenhago, Danlando.

ALIGLIMIGO: Pro la rapida kresko de la aligintoj, ni atentigas, ke post la atingo de la limcifero de 2.200 kongresanoj plu ne estos akceptataj aliĝoj.

REKLAMILOJ: Reklamiloj en Esperanto povas esti liverataj al la kongresanoj kun la Kongresa Libro kontraŭ pago de la poŝtelspezoj.

KONGRESA LIBRO: Ĝi estas en preparo por sendado al la kongresanoj komence de julio. Limdato por anoncoj kaj informoj estas la 15-a de junio.

GAZETARA SERVO: Rajtas ricevi la bultenojn de la Gazetara Servo esperantistoj, kiuj anoncas sin al la Kongreso kun legitimilo de naciilingva aŭ esperantista gazetoj.

ANTAŬKONGRESO: LKK rekomendas partoprenon en la Oficiala Antaŭkongreso en Helsinko 28/7—4/8 1956. Anoncu vin ĉe: L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

POSTKONGRESO: LKK rekomendas partoprenon en la Oficiala Postkongreso en Malmö 11/8—12/8 1956. Anoncu vin ĉe: Esperanto-kongreso, Malmö, Svedujo.

AFISO: Turisma Asocio de Danlando okaze de la Kongreso eldonis grandan afiŝon pri Danlando. Ĝi jam estas sendita al oficialaj instancoj.

STATISTIKO: (ĝis fino de aprilo): Algerio 2, Argentino 1, Aŭstralio 5, Aŭstrujo 16, Belgujo 8, Brazilo 3, Britujo 149, Bulgarujo 2, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 320, Finnlando 99, Francujo 161, Germanujo 178, Grekujo 3, Hispanujo 11, Islando 23, Izraelo 2, Italujo 125, Japanujo 1, Jugoslavio 89, Kanariaj Insuloj 1, Kanado 2, Kongo Belga 2, Maroko 15, Meksikio 1, Nederlando 106, Norda Rodezio 1, Norvegujo 97, Novzelando 1, Portugalujo 2, Sovetunio 1, Svedujo 344, Svisujo 25, Turkujo 2, Usono 15, Venezuelo 1. Sumo: 1816 el 36 landoj (pasintjare 1399 el 31 landoj).

Gian Carlo Fighiera

Konstanta Kongresa Sekretario

Novaj Faldfolioj

La *Porkuraca Administracio de Wiesbaden (Germanujo)* eldonis belan ilustritan faldfolion pri sia kuracejo en la esperanta lingvo: Wiesbaden en ĉiuj sezonoj. La gastoj kiuj trovis tien certe ne bezonos enui, ĉar kiam en pli nordaj regionoj la vintro ne emas finiĝi, oni jam metas en Wiesbaden, la heslanda ĉefurbo, tablojn kaj seĝojn eksteren por ke la gastoj kaj aliaj vizitantoj povu ĝui la unuajn belajn tagojn sub libera ĉielo.

Ankaŭ la *Direkcio de la TERME DI MONTECATINI, Pistoia, Italujo*, eldonis belan ilustritan faldfolion pri la famkonata banloko. La direkto helpas la italan esperantan movadon kaj estus bone se multaj esperantistoj

petus alsendon de ekzemplero de la faldfolio. Sufiĉas skribi esperantlingve per simpla poŝtkarto al la supre menciita adreso.

De la 22a—la 29a de julio 1956, la *Svisa Esperanto-Societo* kaj la *Svisa Esperanto-Instituto* organizos en Münchenwiler, apud Murten-Morat, Svislando, duan internacian kurson pri Esperanto kaj Geonismo, en nobela kastel-bieno. Belan faldfolion pri la aranĝo oni povas akiri ĉe Svisa Esperanto-Instituto, Breitenstrasse 12, Bern.

Belegan faldfolion kun unuflanke bildoj pri pejzaĝoj, diversspecaj vagonaroj kaj aliaflanke granda kolorigita geografia karto pri Okcident-Germanio eldonis la Germana Federacia Fervojo. Bedaŭrinde oni ne indikis la lokon kie

Perdita Ŝanco

FRANCISKO AZORIN — Ilustrita vortaro de Esperanto, unua volumo A — K eldonejo Stylo Mexico 1955, 642 paĝoj, bone bindita.

La ilustrita vortaro de Francesco Azorin estas la plej miriga afero, kiun mi iam vidis. Aperis la unua volumo enhavanta la literojn A — K, ĝis havas 642 paĝojn po du kolonoj en granda formato kaj en fortika bindo. La kostoj estis 6 mil dolaroj. Mi kredas ke neniam en la historio de Esperanto oni eljetis tian por niaj modestaj rilatoj gigantan sumon por tia kompleta fuŝaĵo. La mono estas perdita, por la eldonanto, kiu ne povos vendi sian produkton kaj perdita por Esperanto, ĉar la libro nenion utilas, eĉ pli ĝi domagas, ĉar ĝi estas atenco kontraŭ la fundamento de la lingvo. La aŭtoro faras jenajn pekojn: li enkondukas novajn radikojn — ne por pliriĉigi la vortaron — sed por anstataŭi vortojn jam ekzistantajn, kareco apud karesi arkitrabo apud arkitravo, aŭtomovilo apud aŭtomobilo, faco apud fazo ktp, due li faras absolute fantaziajn etimologiojn, kiuj devas ridigi ĉiun veran lingviston, ekzemple:

„drakona” (laŭ greka legfaranto Drakon) Azorin klarigas, havanta onon de drako, la terurecon, „kanono” estas pafilego havanta onon da kano, nome la tuboformon kaj aliaj fantaziaĵoj. La nova vortaro havas la avantaĝon esti ilustrita, sed ankaŭ tio estas seniluziigo, ĉar la bildoj estas tro malmultaj, ne bonaj kaj la samaj kliŝoj aperas eĉ ĉe diversaj difinoj. La du volumoj enhavos kune 50'000 vortojn, sed ankaŭ tio estas blufado, ĉar la kolonoj estas plenigitaj per tute senutilaj kunmetaĵoj, ekzemple sub ĉe ni trovas ĉealiulo, ĉebrate, ĉebruste, ĉeube, ĉedorse, ĉeesti, ĉeestanto, ĉeestantaro, ĉefaŭke, ĉeflanke kaj ankoraŭ dekunu pliajn tiajn vortojn. La apero de la nova vortaro jam kaŭzis veran skandalon, pri kiu la akademio devos juĝi. En la „Franca Esperantisto” kaj en la organo de SAT jam aperis recenzo de nia granda vortaristo Waringhien, kiu estas vera mortkondamno, ĉar li surbaze de ekzaktaj ekzemploj pravas la absurdecon de la laboro de Azorin kaj liaj helpantoj. Oni povus plori pensante kiom da laborhoroj kaj kiom da bona volo kaj da mono estis konsumitaj por verkaĵo, kiu povus esti tiel bonvena kaj utila se ĝi ne havus tiom da eraroj.

A. B.

oni povas mendi ĝin, sed tre verŝajne ĝi estas havebla ĉe diversaj vojaĝoficejoj kaj estus dezirinde ke multaj esperantistoj havigu al si tiun faldfolion, kiu vere estas belega kun esperanta

daŭrigo p. 8

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16
ANTVERPEN

— Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

teksto. Imitinda ekzemplo por la nederlanda fervoja asocio.

Ankaŭ la Reĝa Aertrafika Asocio en Nederlando (K.L.M.) eldonis belan faldfolion pri sia entrepreno, el kiu evidentiĝas la granda progreso ne nur en la transportado de pasaĝeroj sed ankaŭ en tiu de la ŝarĝoj, kiu de 2.105 tunoj en 1946 pliiĝis al 14.989 tunoj en 1953. Nun sep K.L.M.-flugmaŝinoj ĉiutage transflugas Atlantikon.

(Sekvo de paĝo 45)

sian dankemon per varma aplaŭdo kaj la Prezidanto aldonis kelkajn vortojn, en kiuj li esprimis sian kontentecon pri la fakto ke altnivela parolado, kiel la nuna, de tempo al tempo, okazas por montri ke Esperanto absolute kapablas plenumi la diversajn rolojn al kiuj oni ĝin dediĉas.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw”, Frankrijklei, 4 je la 20.30a h. (la etaĝo).

Junio: (memorige) la 1an: Parolata ĵurnalo; la 8an: Radiofona teatraĵo „Por kvietaj Personoj”; dimanĉe, la 10an: tuttaga ekskurso aŭtoĉara al Aken kaj Montjoie; la 15an: Parolado de S-ro R. Jaumotte; la 22an: Amuza Vespere; la 29an: Debatvespero.

Julio: la 6an: Parolata ĵurnalo; la 13an: Parolado.

BRUGO

Bruĝa Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

La 3-an de aprilo, post la kutima leciono, okazis muzika vespero per disaŭdigo de du verkajoj de Haydn: „Militista Simfonio” kaj „Surpriza Simfonio”, ambaŭ gravuritaj sur longludanta disko de alta fideleco, prezentata kun kelkaj komentarioj de S-ro Karlo Poupeye. Kelkaj dancdiskoj pruntedonataj de S-ro Leopold Maes finis la vesperon.

La postleciona kunveno de la 10a de aprilo estis ĉefe markata per la adiaŭo de S-ino. Van Gompel-De Staercke, kiu transloĝas al Antverpeno. Per ĉarma paroladeto, ŝi dankis por la agrablaj horoj pasigitaj en la grupo, kiun ŝi neniam forgesos. S-ro Ch. Poupeye, prezidanto respondis bedaŭ-

rante la foriron de tiu simpatia grupanino kaj tre fidela kunlaborantino de la parolata gazeto kaj esperante ke, de tempo al tempo, ŝi ankoraŭ revizitos la Bruĝan grupon.

Post la leciono de la 17a de aprilo, S-ro Rob. Lagast interesplene paroladis pri „Radiestezio”, klarigante kelkajn detalojn pri la uzo de vergetoj kaj pendoloj. Sekvis vigla debato pri la sama temo.

La 25an de aprilo, S-ino S. Verbeke-Vanden Berghe, vicprezidantino, anstataŭis la prezidanton, S-ron Ch. Poupeye, kiu, pro lombdoloroj, ne povis forlasi sian hejmon. Kun profesia kompetenteco ŝi gvidis la lecionon kaj la tujpostan kunvenon.

Muzika vespero okazis la 2an de majo, per disaŭdigo de diversaj artaj diskoj pruntedonataj de F-ino S. Manteleers. Sekvis vizito al la kermesa foiro, pri kiu estis raportata dum la kunveno de la 8a de majo.

La kunveno de la 15a de majo estis dediĉata unue al lastaj aranĝoj por la 4a Beneluxa Kongreso en Gento kaj due al parolado de S-ro Karlo Poupeye, kiu priaktis aspekton de sia profesia aktiveco: „Komunaj antenoj por televido kaj radio”. Malgraŭ la teknikeco de la subjekto, li sukcesis interesi la ĉeestantojn.

Internacia kunveno estis tiu de la 22a de majo, ĉar ĝin ĉeestis tri eksterlandaj partoprenintoj de la ĵus okazinta Beneluxa Kongreso: S-ro H. Böcker, el Gelsenkirchen, kaj F-ino A. Concelaar, el Watten-scheid, ambaŭ el Germanujo, kaj Nederlandano: S-ro A. J. Nydam, el Den Haag. Plie ĉeestis alia germana junulo, S-ro Rolf Ahrens, el Gronaŭ. La eksterlandaj kaj la naŭ grupaj kongresirintoj laŭvice raportis pri la Kongreso en Gento kaj esprimis la esperon revidi unu la alian dum la venontjara Beneluxa Kongreso en Nederlando.

Tiu internacia atmosfero daŭrigis la sekvantan tagon, en ĉeesto de la du lastnolitaj eksterlandanoj kaj de la tuta Brita karavano, sub gvidado de S-ro W. M. Goo-des, kiu vizitis la kongreson kaj nun ankoraŭ restanta en Blankenberge, venis al Bruĝo por kune admirati la iluminitajn monumentojn kaj kanaletojn.

Programo de la venontaj kunvenoj:

En la provizora kunveno „CONCORDIA” Zuidzandstraat 5. Tel. 366.24, salono je la 1a etaĝo, dekstre:

Ĉiumarde, je la 20a: leciono: je la 21a: kunveno.

Junio: 5an: Muzika vespero; 12an: Legado de Belga Esp. 19an: Humoraĵoj. 26an: Parolata gazeto.

Julio: 3an: a) lasta leciono de la kurso; b) Debato: Libertempaj projektoj. 10an: a) Ekzameno pri legado; b) Muzika vespero. 17an: a) Skriba ekzameno; b) Humoraĵoj. 25an: a) Disdono de diplomoj; b) Parolata gazeto. 31an: Legado de Belga Esperantisto.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

Kondolencoj

— Al F-inoj Isabelle kaj Yolande VAN PARYS, komitatanoj kaj al F-ino Christine VAN PARYS, membrino de la Bruĝa Grupo, pro la morto de ilia avino S-ino Van Parys-De Pré (+ Beernem, 21/4/56).

— Al F-ino Simonne MANTELEERS, membrino de la Bruĝa Grupo, pro la morto de ŝia avo: S-ro Michel Manteleers, (+ Antverpeno 4/5/56).

Gratuloj

— Al S-ro Hubert SCHALEMBIER, membro kaj eks-kasisto de la Bruĝa Grupo, kiu edziĝis kun F-ino Mireille DUPONT. (5/5/56).

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero: 1230.48)

La 9an de aprilo, okazis parolata ĵurnalo kun plenplena sukceso. Ĉiuj amiziĝis. S-ino E. Staes gajnis la premion kun „Sta Toone”.

La 16an, S-ro Vander Stempel gvidis sperte sian perfektigan kurson. Li paroligis ĉiujn poste por ekzerco.

La 23an, S-ro Wylie organizis Skotan vesperon. Kun granda ĝojo ĉiuj devis provi kelkajn skotajn paŝojn.

La 30an, la temo de S-ro Castel estis elektata por la diskuta vespero. Varna diskuto ekestis, kiu finiĝis per penso de S-ro Schumacher pri „La Granda Ribelo”.

La 7an de Majo sekvis Parolata ĵurnalo multnombre sekvata.

La 14an, denove okazis la perfektiga kurso de S-ro Vander Stempel.

Kaj la 19an la 20an kaj la 21an, tuta grupo da membroj ĉeestis en Gento la BENELUKSAN KONGRESON.

La programo por la sekvontaj semajnaj

Junio: La 4an: Parolata ĵurnalo; la 11an de Junio: S-ino Elly Staes parolos pri „Sibelius” (kun gramofondiskoj); la 18an de Junio: Perfektiga kurso de S-ro Vander Stempel; la 25an: Amuza vespero organizota de S-ino Weyn.

Julio: la 2an: Parolata ĵurnalo; la 9an: Ebla vizito al Marionet-teatro de Toone aranĝota de S-ino Elly Staes; la 16an: Perfektiga kurso de S-ro Van der Stempel; la 23an: Amuza vespero kun S-ino Weyn.